

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĉnt maandelĉjks
Dertiende jaargang
APRIL 1946
NUMMER 4 (142)

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Diegaardesingel 96, Rotterdam-C
Girorekening : 272818 van N. E. C.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO V.z.W.
Redactie en Administratie :
Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West
Postrekening : 326851 van F. E. I.

5 fr.; 's jaars 60 fr. 5 fr.; jarabono 60 fr.
Steunabonement 100 fr. Subtena abono 100 fr.
Voor Nederland 4 fl. Por Nederlando 4 fl.
Overige landen 75 fr. Ceteraj landoj 75 fr.

ESPERANTO IN DE ORGANISATIE DER VEREENIGDE VOLKEN

Dat Esperanto dienen bewĉjst op praktisch gebied, dat Esperanto op stuk van toerisme, handelsbetrekkĉngen, briefwisseling — al wat verband houdt met andere landen — hier reeds in zwang is, elders zijn gemis laat voelen: het hoeft alles geen betoog meer.

Ook niet het feit dat de verkeerde vertaling van één enkel woord meermaals aanleiding heeft gegeven tot internationale spanning en dat veel tijd verspild wordt gedurende internationale bijeenkomsten, zelfs als het zaak is den vrede uit te bouwen!

De taal is een uitdrukkingsmiddel, waardoor het innerlijk leven, dat het uitwendige beslissend richt, tot uiting komt. Oorlog ontstaat uit de afzondering der volken: hoe zou een land zijn buurstaat begrijpen, indien het slechts onbeholpen van gedachten wisselen kan?

Afzondering heeft in 't verleden verscherpt nationalisme geheeten: wrijvĉngen, onbegrip, slachtoffering om « levensruimte » vloeiden er uit voort! Dient dan, voor alles, die isolatie, die meedoogenlooze veroveringsdrang niet geweerd?

Een gunstig vredeclimaat moet in 't leven geroepen worden; het is slechts een som van details: inzicht in 't innerlijk leven, de cultuur, de zeden, de kunstgevoelens en -waarden, de politieke, sociale, economische noodwendigheden, t.t.z. wederzijdsch begrijpen. En kan een tergende afzondering het bevorderen en voeden?

De machtige factor der oplossing is ongetwijfeld de INTERNATIONALE TAAL, het Esperanto: tweede taal voor ieder, HULPTAAL dus, wat eerbied voor het volk als individu medebrenĉgt; NEUTRALE taal, die geen godsdienst of wijsgeerig stelsel apart dient en niet uitsluitend aan een natie toebehoort; GECONSTRUEERDE taal ten slotte, die makkelijk is, die én de elementairste behoeften van den dagelijkschen strijd én de ingewikkeldste vaktermen en de meest verlijnde nuanceeringen van gemoeds- en geestesleven vertolken kan.

Wij ijveren voor die ondubbelzinnige en gewisse oplossing: talrijke Bonden, op nationaal en internationaal plan, bewerken onverpoosd een gedeelte van het wereld-

veld. Doch, dat volstaat niet meer!

De Organisatie der Vereenigde Volkeren, vrucht eener bloedige en trage baring, is geboren. Zij dient de wereldbelangen, de belangen van alle menschen.

Is het niet te voorzien dat men in dit grootsch opzet niet slagen zal zonder de internationale taal! Moet dan niet uit de O.V.V. de stuwkracht losbreken voor Esperanto, om kansrijk den vrede te verzekeren? Daarom zal de O.V.V. Esperanto in voege stellen in het onderwijs, het invoeren voor toerisme, internationale handel en correspondentie, ter bevordering van den socialen vooruitgang.

Te dien einde werd door den Internationalen Esperanto-Bond het lofwaardig initiatief genomen een grootscheepsch petitionnement (*) te organiseeren dat in naam van al de deelnemende organisaties massaal zal worden voorgelegd aan de O.V.V. om deze instelling de dringende noodzakelijkheid van Esperanto voor oogen te brengen.

Iedereen zal thans opstaan en medewerken: niet honderden, maar duizenden verklaringen dienen door ons Vlaamsch Esperanto-Instituut bijeengebracht opdat, in den schoot der Vereenigde Volkeren, de stem van onze Gewesten waardig weerklĉnke!

Iedereen, iedereen wordt opgeroepen: de bestemen onzer plaatselijke vereenĉgingen, die de verdeling en de inzameling van de verklaringen zullen leiden en zelf een voorbeeld van ijver voor hunne medewerkers zullen zijn; de leden, die zich naar de richtlijnen van hun bestuur zullen gedragen, zelf zullen onderteekenen en andere handteekeningen bezorgen en tientallen behoorlijk ingevulde exemplaren zullen overmaken hetzij rechtstreeks aan het Instituut, hetzij langs hun afdeling om; de sympathiseerenden, die zich niet onbetuigd zullen laten; de buitenstaanders wier verantwoordelijkheid thans ook in het gedrang komt.

Op, Samideanoj, op! Ter overtuiging DIRK.

(*) Een exemplaar wordt bij onderhavig blad gevoegd; vraag er andere aan het Instituut: zij worden U onverwijld toegezonden!

La Flandra Pacmonumento profanita!

Abundas en ĉiu lando kiu partoprenis en la sanga konflikto de l' jaroj 1914-18 la monumentoj honore al la « herooj » de la unua mondmilito. Plejofte ili deziras atesti pri « venko » super « malamiko », kaj militistaj paradoj kaj ŝovinismaj paroloj kutime akompanis ilian inaŭguron.

En akra kontrasto kun ili leviĝis en la ebenaĵo apud la tragikmemora Izer-rivero la grandioza pacmonumento starigita memore al la flandraj viktimoj de la unua mondmilito. Leviĝis jes, ĉar de post la mezo de marto pasinta nur ruboj kovras la kripton en kiu oni entombigis ok flandrajn militviktimojn...

La turforma, 50 m. alta, masiva konstruaĵo atestis pri la korpa kaj anima suferado de la flandraj soldatoj. Dum la unua mondmilito la belga armeo konsistis el 63% da flandraj, la frontarmeo el 82%. Tiu plimulto tamen ne ĝuis plej elementan rajton: sub komando de oficiraro ne parolanta aŭ ignoranta la nederlandan lingvon ili suferis plej humilgajn maljustaĵojn. Kiu kuraĝis peti pli rajtan pritrakton oni sendis al la punkampoj de Fresnes, Avours kaj Cézembre por tie nemalofte suferi ĝistombajn persekutojn.

Per kolektado de la necesaj monrimedoj la flandraj soldatoj starigis humilajn tomoŝtonojn sur la lastajn ripozejojn de falintaj kamaradoj. La vorto Flandrujo sur ili estis sufiĉa kialo kaj preteksto por ordoni la forprenon kaj frakasigon de tiuj ŝtonoj. La rubaĵo oni utiligis per konstrui la belan makadamvojon en Adinkerke. Unua profanado...

Post la milito la flandra popolo kolektis la necesan sumon por starigi, laŭ modelo de la profanitaj tomoŝtonoj, grandiozan monumenton kiu kvarlingve portis sur sia bazo la sentencon: « Neniam plu milito ».

Kaj ĉiujare dum difinita dimanĉo de aŭgusto pilgrimis la flandra popolo al la Izer-ebenaĵo apud la urbo Dixmuid, kaj kolektigis ĉirkaŭ la pacmonumento. Komence kelkaj miloj, poste dekmiloj kaj baldaŭ centmiloj partoprenis la pilgrimadon. Neforgesebla estis la unika momento kiam kliniĝis miloj da flagoj kaj leviĝis centmiloj da brakoj por juri fidelecon al la idealoj de la flandraj militviktimoj: rajto por propra popolo kaj fratiĝo de la homaro.

Sub la monumento estis vasta muzeo kun la dokumentoj kaj atestaĵoj pri la korpa suferado kaj malhumiliga traktado de la flandraj soldatoj. En la halo sur la unua etaĝo, en vasta kadro, gigantlitere legiĝis la vortoj « Mi malbenas la militon! » formitaj per sennombraj militordenaĵoj akiritaj de la flandraj soldatoj sur la batalkampo... Jes, tia estis la flandra pacmonumento.

Ĉiujare delegacioj de alilandaj eksmilitintoj, egale ĉu « amikaj », ĉu « malamikaj », ĉeestis la solenajon en frata sento de internacia solidareco. Flandrujo fieris pri sia unika pacmonumento kaj la pacamantoj de la tuta mondo povis ĝin envii.

Ne nur pro ĝia paca karaktero ĝi estis kara al la flandra kaj al la alilanda esperantistaro kiu sciis pri ĝia ekzisto, sed ankaŭ pro tio ke ĉiu surskribo interne de la monumento estis ankaŭ en Esperanto. Granda tabulo ĉe la enirejo de la kripto salutis la esperantistojn kaj klarigis la signifon de la monumento. Ampleksa broŝuro pri ĝi aperis en la internacia lingvo kaj ĉiu vizitinto-esperantisto memore ĝin ricevis. Krome la gardisto kaj la lististo konis kaj povis esperantlingve doni klarigojn. Invitaj prospektoj kaj afiŝoj surhavis ankaŭ esperantan tekston...

Ĉiujare la flandraj esperantistoj multnombro partoprenis la pilgrimadon kaj la Flandra Ligo Esperantista tie deponis grandan florkronon. Dume giganta streĉtuko apud la Izer-ponto atentigis la centmilojn da flandraj pri la valoro de Esperanto por internacia fratiĝo...



LA SUPRO DE LA MONUMENTO
la vundo en la flanko
atestas pri dum milita aeratako

La pasintjara militfino signis la komencon de kontraŭ-flandra teroro kiu kulminis en sakrilegia atenco. Dume oficialaj voĉoj proklamadas ke Flandrujo ĝuas sian plenan rajton!

En hela nokto senkonsciencaj tomo-profanuloj « nerimarkite » sukcesis alveni kaj lokigi la necesajn tunojn da eksplodajo en la kripton por detruĉi per unu bato la kolosan monumenton.

Certaj belgaj gazetistoj agitis por la detruo de la flandra monumento kaj belgaj « eminentuloj » profetis ĝian baldaŭan malaperon. Nun la tuta kontraŭ-flandra koalicio esperas ke senanima ŝtatmonumento ĝin anstataŭos. Iluzio! Ĝi vivos plu en niaj koroj, ĝis el la ruboj restariĝos la monumento kiu restas nia fiero!

ECO.

— Flandra Ligo Esperantista kaj Flandra Esperanto-Instituto donacis 500 bfr. por le rekonstruo de la flandra militmonumento. Diversaj sekcioj de FL. L. E. jam sekvis tiun ekzemplon.



NUR
RUBOJ
KOVRAS
NUN LA
KRIPTON
DE LA
FLANDRAJ
MILIT-
VIKTIMOJ

MI PREZENTAS...

La modernan
Esperanto revuon
* belilustrita
* interesa
* 12 paĝa

Noveloj - artikoloj - poezioj

La plej bela, la plej interesa!
Petu specimenan numeron sendante
unu internacian respondkuponon al

MONDA REVUO ILUSTRITA
Box 30, Randers, DANMARK.
Abonkotizo por 1946 estas:
68,50 bfr.

Pagu al la landa peranto:
Sro MAURICE DAEMS
Heyvaertstr. 159, Molenbeek-Brussel
(poŝtkonto: 3329.95).

OBSERVOJ

LIBRO-TAGOJ.

Ĉeti libron la 15-an de decembro estas kutimo kiu jam firme radikiĝis en la esperantistaro. Ĉiu ne tro freŝdata esperantisto almenaŭ scias pri la libro-tago.

Malpli konata estas la 14-a de aprilo, speciale dediĉata al la originala esperanto-libro. Memori ne nur la naskiĝon sed ankaŭ la forpason de la aŭtoro de la internacia lingvo per efektiva kunhelpo al la starigo de la plej impona Zamenhof-monumento: la esperanto-literaturo — ĉu eblas imagi tradicion pli laŭdindan?

Mi ne scias kian kriterion la kara leganto aplikas, sed mi kutime taksas la valoron de esperantisto laŭ ties libro-posedo: montru al mi vian esperanto-bibliotekon, mi diros kia esperantisto vi estas!

La 14-a de aprilo estu la tago de la originala esperanto-libro! Ni apogu niajn originalajn verkistojn: esperanto jam estas sufiĉe matura por havi propran literaturon! **PIK.**

ENGELSCH DE TWEDE TAAL ?

Onder den titel: « Ook een probleem: de O.V.V. een Toren van Babel » ontdekt Rip in de « Nieuwe Gazet » het probleem van de internationale taal.

Meteen wordt ons de oplossing aan de hand gedaan: « Overal leere men de jeugd, naast de eigen taal, in de eerste plaats deze welke als de internationale zal aangeduid worden. Deze keuze en deze aanduiding zijn het werk van de Organisatie der Vereenigde Volken, en als deze organisatie het Engelsch kiezen zou, — dan zou er voor de Britten en Amerikanen over heel de wereld al dit profijt aan vastzitten: dat er voor hen feitelijk dan niets zou veranderd zijn. »

GEEN OPLOSSING !

Wij denken integendeel dat er dan heel wat zou veranderd zijn, en wel in het voordeel van het volk waarvan de taal ons als algemeene hulptaal zou worden opgedrongen!

Het getuigt van weinig doorzicht zich dienaangaande blind te staren op het Britsch Imperium, dat anachronisme met zijn honderden miljoenen inwoners waarvan het Engelsch NU de bestuurstaal is!

Oppervlakkige geesten zien nu in het Engelsch DE algemeene internationale taal, voor twintig jaar ging hun voorliefde naar het Fransch, hoe zullen ze over twintig jaar oordeelen?

Met andere woorden: dergelijke oplossing is er geen!

ESPERANTO DE EENIGE OPLOSSING.

In dit verband lichten we uit « Flandra Katoliko », het orgaan van het Katholiek Vlaamsch Esperanto-Verbond, volgende rake beschouwing: « Op den duur zal men ook moeten beamten dat dit taal(on)-kundig gesukkel een gevaarlijke psychische handicap beteekent. Koppig vasthouden aan het gebruiken van de eigen taal (op internationale bijeenkomsten wordt hier bedoeld. Nota van de red. van F. E.), of de taal gebruiken van één der tenoren in het internationaal concert, staat gelijk met zich afzonderen, zich uitsluiten; respectievelijk partij kiezen, blok vormen. En komt in een dergelijke stemming maar eens tot verstandhouding!

SYMPATHIEK,

TACTISCH EN DEMOCRATISCH !

Verder: « Met een beetje goeden wil en massale inschikeling van de radio moet het mogelijk zijn de kennis van Esperanto te verspreiden, en dit zou heel wat sympathieker en tactischer zijn (en wij durven er aan toevoegen: democratischer! Nota v. d. red. F. E.) dan het opringen van « English by radio ». Dit laatste maakt niet alleen de Russen en de Aziaten achterdochtig, maar ook vele bewoners van het Europeesche vasteland. En terecht. Want dit zoeken naar taaluitbreiding is zoeken naar machtsuitbreiding. Het is een vorm van imperialisme, van « pénétration pacifique », waartegen het nationaal gevoel van direct of indirect bedreigde volkeren vroeg of laat in opstand komt en dan is 't gedaan met het « pacifiek » van de « penetratie ». Het wordt een geval voor de... Veiligheidsraad, die tegen dien tijd misschien zal adviseeren tot het gebruiken van... Esperanto. »

DE KLINKERS :

OPEN-GESLOTEN UITSPRAAK

(Vervolg)

In de vorige bijdrage werd de houding van Zamenhof, Ĉeĉeĉ en Wüster geschetst. Welke meening houden K. Kalocsay en G. Waringhien er in « Plena Gramatiko de Esperanto » op na?

Zij oordeelen dat de spelling Wüster het meest de algemeen gebruikelijke uitspraak benadert, alhoewel de ervaring nog, buiten de gemelde vormen (korte è en lange é, korte o en lange ó), op het bestaan wijst van een vijfde en een zesde schakeering: de lange open è (è:) en lange open o (o:).

De regels nopens de verscheidene e- en o-vormen vatten zij samen als volgt:

1. Onbeklemtoonde lettergrepen: korte è en o (dus: open) b.v. sènprètènda, for; noteer dat ho en ve lang zijn en derhalve ook gesloten uitgebracht worden (hó:, vé:).

2. Beklemtoonde lettergrepen gevolgd door niet meer dan één medeklinker (open lettergrepen): lange é en ó (gesloten) b.v. pè:ti, bó:na.

3. Beklemtoonde lettergrepen gevolgd door meer dan één medeklinker (gesloten lettergreep): korte è en o (open) b.v. sèndi, pordo.

4. « Eksakcentaj » lettergrepen t. f. z. de beklemtoonde lettergrepen van het deel van een samengesteld woord dat zijn accent kwijt wordt omdat de beklemtoonde lettergreep van het hoofddeel van het woord onmiddellijk volgt: lange è en o (open) b.v. libè:rtempo, o:rce:no.

Deze normen blijken eenigszins ingewikkeld: doch, zijn zij niet de vrucht van een vrije evolutie, die de eeuwige « meza kaj mezlonga » uitspraak heeft genegeerd, en, kan men anders dan de uitslag vaststellen? Overigens, men zal de moeilijkheden en de verscheidenheid niet uitschakelen door een loutere miskenning van de werkelijkheid en de voorgestelde oplossing, een eenvoudig systeem, biedt alleszins het groote voordeel een eenvormige uitspraak in de hand te werken.

Het is nochtans evident dat in Esperanto, de verscheidene behandelde schakeeringen een ongelijk belang vertoonen. Inderdaad, doorslaand is het lang karakter van de beklemtoonde lettergreep: de open-gesloten uitspraak, alhoewel merkbaar, beïnvloedt de verstaanbaarheid niet. De even lange uitspraak van alle klinkers, met de regelmaat van een machinegeveer, is te vermijden: de lange beklemtoonde lettergreep laat een rustmoment toe en vertraagt den vloed van het gesprek op bepaalde doch afwisselende afstanden.

Het weze aangestipt dat een correcte accentuatie geen klemtoon eischt op iedere tweede lettergreep: dergelijke zware, plompe en tenslotte vervelende uitspraak zal doelmatig geweerd worden door een volledig accent op de enkele beklemtoonde lettergreep van ieder woord en een vlucht over de éénlettergrepige en de enclitische woorden (voornaamwoorden, telwoorden, voorzetsels, correlatieven).

Ter illustratie en concrete voorstelling van het geval der klinkers, lichten wij hieronder een voorbeeld uit de « Plena Gramatiko » (blz. 25) met aanduiding van de schakeeringen als volgt: **klemtoon** door vetdruk, **lang-kort** karakter door een opvolgend dubbel punt achter den langen klinker (de korte klinkers worden niet gemerkt!), de **open e-o** door resp. è-o, de **gesloten** door resp. é-ó, doch slechts in de geaccentueerde lettergrepen

LA STUDANTO

DE PHONETIEK (X)

(in de onbeklemtoonde is het van geringer belang):

Ka:ra sinjò:ro! Vian manuskriptan artikó:lon mi lé:gis kaj hodi:aŭ mi ĝin resèndis al vi. La malgó:jaj idé:oj, kiujn vi espri:mis pro la nó:vaj vortoj en la laste aperintaj vorta:roj ŝajnas al mi tute senkaŭzaj; laŭ mia opini:o via tí:mo vé:nis nur de tío, ke vi ne tu:te ĝuste prezèntas al vi la esèncan signi:fon de tiuj pligrandiĝi:taj vorta:roj.

T. v. G.

OEFENING 12

Hieronder, ter vertaling in 't Esperanto (A) en in 't Nederlandsch (B), kleine opgaven. In ons volgend nummer publiceeren wij de modelvertaling, met aanduiding van eventuele varianten en aanteekeningen, naargelang zij uit de inzendingen noodig blijken.

De oefeningen worden talrijk ingewacht langs de redactie om!

Let wel! Wie persoonlijk zijn werk verbeterd terugverlangt, verzuime niet een zegel voor antwoord in te sluiten.

Komaan, de gelegenheid grefig te baat genomen! Aan 't werk!


A. Zinnetjes.

1. Gij koopt dure boeken; maar zulke boeken moet ge niet lezen, omdat zij te wetenschappelijk zijn.

2. Het bezoek van zijn schoonbroeder deed hem een onuitsprekelijk genoegen.

3. Een koning bezocht een klein dorp en wenschte eieren te eten; de waard gaf er drie en rekende zes gulden.

4. De koning was verwonderd en vroeg of de eieren zoo zeldzaam waren in de streek; daarop antwoordde de waard: « Niet de eieren zijn zeldzaam, doch de koningen! »



EINDELIJK TERUG VERKRIJGBAAR TRA LA LABIRINTO DE LA GRAMATIKO

door F. FAULHABER

Een uitstekende handleiding in de nederlandsche taal ten dienste van cursusleiders en examencandidaten.

Vierde druk. 340 pag. groot formaat

In stevig linnen band : 75 frank

Bestel onmiddellijk uw exemplaar bij

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

B. Japanaj moroj.

Ekster la hejmo, japanaj geedzoj, kiuj ankoraŭ observas la tradicion, kondutas kvazaŭ ili ne konus unu la alian. Oni do ne renkontas tie ĉi (*) paroĵn, kiuj kuniras brak-enbrake. Nenie estas videbla interkizado. Eĉ patrino ne kisas sian suĉinfanon, — sed tute senĝene vidigas siajn mamojn. La malkaŝa interkizado estas por japanoj io tre vulgara. La manpremo estas tute escepta kaj fero importita. La japanoj salutas sin reciproke per rektangula riverenco, se ili estas eksterdome; endome, ili genuas sur maton kaj tiam la kapo preskaŭ tuŝas la plankon. (El « Leteroj de E. Lanti », p. 197.)

(*) t. e. en Osaka en 1937 (Noto de la redakcio).

VERTALING VAN OEFENING 11

A. Frazetoj.

1. Ĉu vi konas sinjoron X., nian (nunan) (1) prezidanton? Se vi ne konas lin, mi prezentos vin.

2. Je nia miro vi hieraŭ ne ĉeestis nian kunsidon; vi eĉ ne senkulpigis (2) vin.

3. Mi havas du malgrandajn fratojn: la pli (3) juna nomiĝas Jan.

4. Estante (4) sur via loko, mi sendube estus alie aginta; eble ĉar mi estas pli praktika.

5. Po kvar (5) la infanoj kriante eniris.

6. Vizitinte (6) la ĝardenon de sia onklo, la infanoj (6) kunprenis tiom da pomoj kiom ili povis porti.

7. Ju pli longe la kandelo brulas, des pli ĝi mallongiĝas.

8. Tiu ĉi viro estas tre diligenta (7); de la mateno ĝis la vespero li laboras por sia familio.

9. Oni estimu (8) la homojn ne laŭ ilia (9) deveno (10) aŭ riĉo, sed laŭ ilia (9) laboro.

Notoj: (1) oni povus ne uzi **nunan**, pro la -ant-finajo; ĉu **gewezen voorzitter** ne fariĝus **prezidinto**? (2) aŭ: ekskuzis.

(3) ne: plej, ĉar oni komprenas nur **du** fratojn. (4) Aŭ, pli peze: Se mi estus (estinta). (5) aŭ: laŭ kvaropoj. (6) aŭ, pli peze: post kiam la infanoj vizitis..., ili... (7) aŭ: laborema. (8) aŭ: taksu.

(9) ne: sia, ĉar oni ne resendas al la deveno de la subjekto, sed de la komplemento (Homojn). (10) aŭ: origino.

B. Taalmoeilijkheid.

Voor eenige eeuwen (1), spraken de Deensche hovelingen veel Duitsch (2). In die periode (3) was daar een IJslandsche bisschop te gast. Tijdens een onderhoud (4) met den vreemdeling, vroeg de koningin: « Hoeveel kinder (in 't Duitsch: kinderen) hebt U, IJslanders, gewoonlijk? » Meenende dat de koningin had gezegd (5) **kindur** (in 't IJslandsch: schapen), antwoordde de bisschop: « Dat verschilt; ik b.v. heb een driehonderdtal **kindur**. » Verwonderd vroeg de koningin opnieuw, omdat zij meende dat de bisschop had gezegd (5) **kindur**: « Waar zet U zoo'n aantal kinder? » Steeds meenende dat zij had gezegd (5) **kindur**, antwoordde de bisschop: « Wij onthooiden ze en eten ze (op). » De koningin verwijderde zich snel en wilde niets meer weten over de zedeloze en barbaarsche IJslanders. (Naar Olav Kristjansson. Uit « La multekolora Libro, blz. 124).

Nota's (1) of: enkele eeuwen geleden. (2) of: de Duitsche taal. (3) En ware in 't Esperanto juister geweest, vermits niet **gansch** die periode te gast was. (4) of: zich onderhoudende met... (5) **Zegde** is in 't Nederlandsch foutief, omdat de uitgedrukte handeling aan deze in den hoofdzin uitgedrukt (de bisschop antwoordde), voorafgaat.

LA REDAKCIO RESPONDAS

Pri la februara ekzerco, nro 10:

Ni ĝojis ĉar tiom da Studantoj ensendis kaj ĉar la kvalito de la taskoj estas tiel alta. Generale ambaŭ tekstoj estis tre taŭge tradukitaj. En « Malespero » mi citas « dadelijk » (tuj) anstataŭ la korekta « plots » (subite) kaj notis tre ofte: « de menschen die haar verlieten, zich niet bekommerden », kiam la antaŭtempo, kiu klare montriĝis en la esperanta teksto, nepre devis esti esprimita: « die haar ver-

laten, zich niet bekommerd hadden ». En la frazetoj, mi renkontis i. a.: (1) **dolĉa** (dolĉaj: la subjekto estas plurala); (2) por savi **sia vivo** (sian vivon: rekta komplemento), lian vivon (sian: oni resendas al la subjekto, alie la nuanco estus indikita en la flandra); (3) **multa** (multaj: plurala subjekto scio kaj sperto); (4) al **ilia kunvenejo** (**sia**: oni evidente resendas al la subjekto); (7) **malgraŭ** li jam... (kvankam, **malgraŭ** (**tio**) ke — malantaŭ **malgraŭ**, prepozicio, sekvas substantivo, male, kvankam aŭ **malgraŭ** (**tio**) ke estas subjunkcioj kiujn sekvas subpropozicio konceda); **eltrinkis aŭ malplenigis glason**: ne eraraj sed ne tute fidelaj tradukoj; kial ne **trinkis glason malplena**? Ĉu ĉar oni timis la formon **malplena**?

J. D. St. Mariaburg, K. H. Schoten, A. L. Antwerpen, C. R. Aalst, E. D. B. Assebroek, M. W. Breedene aan Zee viaj taskoj estis resenditaj kun personaj notoj.

Verda korekta teksto, ne tute perfekta pro « la eltrinkis glason ».

A. T.: erara traduko en B. (7): la laboristoj anst. strikantoj.

P. M. Genk: en B-5 surhavas branĉojn: sur-superfluas; en B-6 ne estis vera; same en B-7: eltrinkis pluan glason.

La tri supraj ensendaj estis tre taŭgaj kaj ne enhavas aliajn erarojn.

J. H. Avelgem: viaj demandoj estis detale responditaj.

Provanto: tre bona ensendo, bedaŭrinde ne tute korekta. « Romanverkisto » estas pli ĝusta ol « romanisto » (ne necese verkas romanojn). « Pensi al »: « pensi pri » ŝajnas stile preferinda. « Levigi demandojn »: « levi » sufiĉas! Pri « kiel » (kiaj), vidu supre. La nederlandigo de « Fideleco »: nur unu rimarkigo, « nepre vigele » ŝajnas al mi pli perfekte tradukita en nia propono (beslist, uitgesproken monter of opgewekt) ol en la via (onvermijdelijk waakzaam).

Nepre skribu al N. I. R., E. Flageyplein, Elsene-Brussel, petante la elsendon de Radio-kursoj!

REGELMATIGE ESPERANTO-UITZENDINGEN

Dagen	Uren	Golfengten	Stationsnamen	Programma
Zondag	19.10-19.20	—	Bern	Int. R. Kruis
	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
Maandag	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
	22.50-23.00	—	470	Praag II Voordrachten
Dinsdag	23.00-23.15	—	40.06	Warschau Berichten
	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
Woensdag	22.50-23.00	—	325	Moravska Berichten
	17.00-17.15	—	352	Sofia Voordracht
Donderdag	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
Vrijdag	22.50-23.00	—	470	Praag II Berichten
	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten
Zaterdag	22.30-22.45	1571	Praag I	Berichten

N. B. — Deze lijst is verre van volledig: alleen de groote en doorgaans goed hoorbare zenders zijn erin opgenomen!

Amanto de arto, historio, pitoresko kaj belo venu Bruĝon, la muzeo-urbo!

En la vasta mondo eble ekzistas ekvivalento kun egalaj signifo kaj valoro historiaj, sed nenie retroviĝas la specifa atmosfero de la iama « Venecio de la Nordo » kiu, simile al grandaĝa damo, sciis konservi sian aspekton kaj nobelan fieron.

Bruĝo, nenia anakronismo vin makulas, nenia konstruaĵo modernstila rompas vian mezepokan ĉarmon. Vagante tra viaj stratetoj kaj placoj, laŭ viaj sennombraj kanaletoj, sur viaj pitoreskaj pontoj, senpene oni povas al si imagi vian gloron pasintan.

Urbo de la senbrida romantismo, amatino de poetoj kaj artpentristoj, naskiĝurbo de l'flandra primitiva pentroarto, ene de viaj muroj laboris kaj kreis la mondfamaj Memling kaj Jan v. Eyck.

Komplekso de palacoj, sinjoraj bienoj, burĝaj domoj, via iama brilo fiksiĝis en ĉiu ŝtono de viaj fasadoj, turoj, pordegoj kaj remparoj.

Urbo de la flandra punto, vi mem estas delikata, altvalora punktaĵo.

Lulilo de la malkvietaj gildoj kaj korporacioj, de la frue akiritaj popolrajtoj, mondhaveno, vi estis la ardanta koro de Flandrujo.

Relikvo, kun pia sento vin vizitas ĉiu sentema koro.

Por kompreni la estintan gloron de nia kongresurbo necesas kelkaj historiaj klarigoj.

Dum la kvina jarcento la maro subakvigis grandan parton de Flandrujo, laŭlonge de la marbordo. Ĝi envenis la teritorion ĝis distanco de proksimume 12 Km.

Dum la jarcentoj kiuj sekvis al la kvina, la maro pli kaj pli retiriĝis ĝis la loko kie ĝi nuntempe estas. Sur tiu areo restis multaj marĉoj kiuj sekigis formante niajn fruktoricajn polderojn.

De tiu subakvigo tamen restis la « Swin », la iama larĝa akvovojo de la estinta mondhaveno Bruĝo.

Tiun lastan nomon oni trovis unuafoje menciita en la fino de la naŭa jarcento sur trovitaj 139 moneroj. La fakto ke Bruĝo en tiu tempo jam posedis monfabrikejon rajte supozigas ke la urbo jam havis sufiĉan gravecon en tiu tempo.



MADONO KUN INFANO
pentraĵo de Hans Memling
(1430-1494)

En la naŭa jarcento Bruĝo ne nur posedis larĝan trafikvojon al la maro, la « Swin », sed konsiderindan fortikaĵon por ŝirmi la loĝantaron kontraŭ la invadoj de la Normanoj kiuj klopodis elŝipiĝi sur la plej taŭga loko : Bruĝo. Tiu urbonomo ne devenas de « brug » (ponto) kiel oni inklinis supozi, sed de la norda vorto « Brygja », kiu ankoraŭ nun signifas : elŝipiĝejo.

La favora situo de la urbo klarigas la gravecon kiun ĝi rapide akiris. Baldaŭ ĝi iĝis la daŭra restadejo de la sinsekvaj landestroj : la grafoj de Flandrujo.

La 13-a estis la ora jarcento por Bruĝo, kies apogeo situas ĉirkaŭ la jaro 1300. Tiujare venis varŝipoj el Anglujo, Skotlando, Irlando, Norvegujo, Danujo, Svedujo, Ruslando, Hungarujo, Behemio, Germanujo, Polujo, Bulgarujo, Navario, Aragono, Kastilio, Andaluso, Granado, Galicio, Portugalujo, Fezo, Maroko, Tunisio, Armenio, Tatario, Francujo, Gaskonio, Sicilio, Malorko, Sardinio, Konstantinopolo, Jerusalemo, Egiptujo kaj aliaj landoj kaj lokoj. Pro sia trafiko kaj komerco, lukso kaj bonstato, Bruĝo akiris la multsignifan kromnomon : Norda Venecio.

Ĝis tiam la sinsekvaj grafoj regis preskaŭ suverene super Flandrujo. Sed la francaj reĝoj komencis avidi la riĉon kaj prosperon de la najbara graflando kaj ekintrigis. Komenciĝis tragedia epoko.

NIA KONGRESURBO : Bruĝo la bela



Filipo la Bela, reĝo de Francujo, sukcesis komplete subpremi Flandrujon. En majo 1302-a okazis sanga venĝo : ĉiu franco kaj francemulo estis mortigitaj de la ribelantaj Bruĝanoj.

La franca reĝo sendis potencon armeon por puni la ribelintajn flandrojn kaj samjare, la 11-an de julio, apud Kortrijk, okazis la historia batalo de la « Oraj Spronoj » en kiu komplete malvenkis la franca armeo. La 11-a de julio iĝis la nacia festotago de la flandroj.


Tamen la insidoj ne ĉesis. Sed venis pli granda malfeliĉo : la maro daŭre retiriĝis kaj ankoraŭ la akvo el la « Swin »! La naturo donacis larĝan akvovojon — kaj ĝin reprenis.

Ne tre sukcesaj estis la laboroj entreprenitaj por forigi la amasigantan sablon el la « Swin ». Fosita kanalo alportis portempan savon kaj la urbo konis ankoraŭ grandan prosperon dum la regno de la dukoj de Burgondio kiuj iĝis la landestroj de Flandrujo. Turniroj solenaĵoj kaj festoj estis translime famaj. La komerco floris kaj ankoraŭ la scienco kaj arto.

En tiu tempo loĝis en Bruĝo Memling kaj van Eyck, la presisto Jan Brito kaj ties lernanto Caxton kiu poste enkondukis la presarton en Anglujon. Bruĝaj muzikistoj estis ĉe la franca kortego kaj en Venecio. Alsvarmis komercistoj kaj korteganoj, ili alportis negocon kaj prosperon.

Sed la akvo ne ĉesis retiriĝi. La ŝipoj ne plu povis atingi la urbon, la komercistoj ĝin forlasis. Antverpeno kaj Dordrecht komencis flori.

Bruĝo mortis. Depost la 17-a jarcento ĝi restis senŝanga : bela dormantino vane atendanta la vekigan kison.



Urba Muzeo :
PENTRAJO PRI KONONIKO VANDERPAELE
van Eyck (1390-1440)

XI-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

Brugge, Pentekosto 1946
(8-9-19 Junio)

2-a KOMUNIKO

Ni speciale dankas ĉiujn enskribintojn kiuj, tuj post nia unua alvoko pagis la kongreskotizon : ili konsiderinde helpis nian organizan laboron!

Same dankataj estu la grupoj kaj samideanoj kiuj prunte sendis streĉukojn kaj fasadflagojn. Ni faras novan alvokon por ke aliaj sekvu tiun ekzemplon. Same pri la samideanoj kiuj pretas aktive kunlabori en la dimanĉa festvespero : deklamistoj, kantistoj, muzikistoj anoncu vin!

Ni atentigas ankaŭ ke la rabatita kongreskotizo nur validas ĝis la 15-an de majo. Same la prezojn de hoteloj ni nur garantias ĝis tiu dato.

Ĉiu kongresano sin nepre prezentu unue en la akceptejo por ricevi ĉiujn kongresdokumentojn kaj rajtigilojn!

PROVIZORA PROGRAMO

SABATE :

- 16-a h. Malfermo de la akceptejo.
- 18-a h. Kunveno por la membroj de F. E. I.
- 19-a h. Sonorilarkoncerto.
- 20-a h. Interfratiga festo kun balo.

DIMANĈE :

- 8-a h. Malfermo de la akceptejo.
- 9-a h. Meso kun prediko en Esperanto en la historia kapelo de la « Sankta Sango ».
- 10-a h. Oficiala akcepto en la urbodomo.
- 11-a h. Generala jarkunveno de Fl. L. E. en la gotika salonega de la urbodomo.
- 13-a h. Komuna fotografado.
- 14-a h. Komuna tagmanĝo.
- 17-a h. Boatekskurso sur la urbaj kanaloj aŭ vizito de la urbaj vidindaĵoj.
- 20-a h. Esperantista festo (varia programo).


LUNDE :

- 10-a h. Forveturo por la ekskurso al la marbordo.
- 16-a h. En Knokke ĉe maro : fermo de la kongreso.

VIZITU LA LIBRO-STANDON

kiun organizas Flandra Esperanto-Instituto
OKAZE DE NIA KONGRESO !

KAJO
DE L' ROZARIO
(Rozenhoedkaai)
en la fono :
LA BELFRIDO



PLACO
JAN VAN EYCK
kun statuo
de la fama flandra
artpentristo

VERDA KRONIKO

★ La konata esperantistino Lidja Zamenhof vivas en Sovetio laŭ letero ricevita en Ameriko pere de la Internacia Ruĝa Kruco.

★ La unua postmilita kongreso de la francaj esperantistoj okazos je Pentekosto en Lyon.

★ La aŭstria Ministro por Instruado alasis Esperanton kiel instruobjekton en ĉiuj lernejoj. Aperis post nelonge « Aŭstria Esperantisto » la organo de « Austria Esperanto-Federacio » (Neutorgasse, 9, Wien I). Aperis nova lernolibro « Freude durch Esperanto » kaj poŝvortaro Esperanto-germana kaj germano-Esperanto. Estas anoncintaj la baldaŭa apero de literaturaj verkoj.

★ En Philadelphia aperis ampleksa 300-paĝa propaganda verko « The green star ».

★ La tria internacia kunveno de la esperantista junularo okazos en Blankenberge de la 2-a ĝis la 5-a de Aŭgusto. Anoncu vin ĉe Fl. Meydam, Owenstraat 59, Leerdam (Nederlando).

★ Laŭ la germana gazeto « Wochenkurier » Esperanto estas denove permesata en Germanujo.

★ Dum la Lyon-a Foiro okazos Esperanto-tago. Informojn donas la Esperantofako de la Lyon-a Foiro : rue Menestrier, Lyon III.

★ Esperanto estas instruata en la Sofia ŝtat-universitato.

Plaatselijk Nieuws

ANTWERPEN. — Op 2 April II. oogste S.ano Willekens en verdiend succes met zijn uiteenzetting over « La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo ».

Op Woensdag 8 Mei handelt Dr. T. van Gindertaelen over « La Mistiko kaj Esperanto » te 20 u. in het Esperanto-Huis der Lange Leemstraat 127.

BRUSSEL. — In het « Mundaneum » geeft leeraar Houbron een Esperanto-cursus voor een twintigtal leerlingen. In het St. Thomas-Instituut wordt een cursus gegeven voor onderwijzers en onderwijzeressen.

Het tweede feest der Brusselsche Esperantisten op Zaterdag 27 April kende insgelijks een groot succes. Een Esperantocabaret gevolgd van een danspartij was iets naar de gading der jonge Esperantisten uit de hoofdstad. Voorwaar het E. K. I.-feestcomité mag met genoegen terugzien op het gepresterde werk tijdens het afgelopen seizoen.

MECHELEN. — De Esperanto-stand door het Vlaamsch Esperanto-Instituut ingericht op de algemeene boekententoonstelling in de stedelijke feestzaal bij gelegenheid der Orvalodagen had tijdens de Paaschweek veel bekijks. Immer in het kader der Orvalodagen sprak in de leeszaal der stedelijke bibliotheek leeraar Symoens over Esperanto op Donderdag 25 April jl.

Op 24 April jl. werd alhier een Esperantovereeniging opgericht: « La Verda Lumo ». Van meet af aan sloot deze vereniging zich aan bij den VI. Esperantisten-Bond. Een cursus ligt in het verschiet en de propaganda hiervoor werd met enthousiasme aangepakt. We wenschen « La Verda Lumo » veel succes!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

ATENTU: Bonvolu antaŭe legi la regularon en la januara numero.

PREMIO: Fino G. Mallet gajnis la februaran premion (Oficiala Vortaro de S. Grenkamp). Ni gratulas!

SOLVO DE LA 11-a ENIGMO

Jen ekzemploj de metamorfozoj, sed pluraj aliaj, same bonaj solvoj estis eblaj: Pomo, kono, kono, kino, vino. — Pasto, parto, parko, porko, polko, pilko, silko, sulko, bulko. — Truo, gruo, grio, krio, ario, apio, apro, aero, tero, turo. — Vitro, mitro, metro, metio, mesio, misio, minio, pinio, pinto, ponto, poeto, poemo, premo, tremo, tramo, gramo, graso, glaso. — Ligno, lieno, bieno, biero, fiero, fibro, libro, litro, mitro, metro, metio, mesio, misio, minio, manio, manko, marko, marto, farto, forto, forno, korno, kordo, pordo, perdo, perlo, merlo, meblo.

12-a ENIGMO: KRUCVORTO

HORIZONTALE. — 1. en alta grado; amfibio (R); nombro. — 2. korelativa vorto; granda, laŭ vertikala kaj suprenira direkto (R). — 3. ne preni kun si (R); balanceti infanon por ĝin dormigi (R); oni havas ĝin sur la fingro (R). — 4. ni kutime uzas ĝin ĉe la manĝoj (R). — 5. legomo (R); konstruaĵo, parto de farmbieno (R). — 6. kompetentulo, specialisto (R). — 7. korelativa vorto; ĉiela korpo (R). — 8. nun (R). — 9. kvitigi sin de ŝuldo (R); korelativa vorto; deviga regulo (R). — 10. arbo (R); persona pronomo. — 11. parto de pomo (R); frukto (R); enuigi (R).

VERTIKALE. — 1. floro (R); ĝi kuŝas sur la planko (R). — 2. persona pronomo.

— 3. plia krom la kutima nombro (R); ĝi estas formita per du sin renkontantaj linioj (R). — 4. movo de la maro (R). — 5. forpuŝi la malpurajn per speciala ilo, iel simila broson (R); glorkrono ĉirkaŭ la kapo de sanktulfiguro (R). — 6. ununura (R); trinkaĵo (R). — 7. detranĉi herbon per speciala ilo (R); forlasi fermantan spacon (R). — 8. iu religio (R). — 9. funde sensprita (R); disfendi en multajn pecojn (R). — 10. parto de teatraĵo (R). — 11. ilo por dispartigi lignon, metalon, k. t. p. (R); iu membro de reĝa familio (R).

Bonvolu skribi vian solvon sur apartan folion kaj havigi ĝin al la redakcio antaŭ la 15-a de majo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

Verantwoordelijke uitgever F. E. I. — Bestuurder: E. Cortvriendt, P. van Humbeekstraat 3, Brussel. Drukkerij A. Hessens, Komediantestraat 12, Brussel.

ANONCETOJ

Ieder woord of afkorting : fr. 0.75
Minimum : fr. 15.—

KORESPONDEMULOJ abonu « **Leterkolombo** », la monatan internacian korespond-gazeton redaktatan nur en E. kun enhavo interesa kaj distra. Jarabono kostas 1.50 us. dol. aŭ 20 r.k. Redakcia adreso : Leterkolombo, **Seinäjoki**, Tammilehto, Finnlando (Suomi).

RADIOSTEZISTOJ mi dez. kor. kun vi! Precipe francaj radiosteziistoj skribu al J. Hellebuyck, Doornikstraat, 68, Avelgem (W. Vl.), Belgujo. Certe respondas!

LETERVESPERON aranĝas E-societo « **Suda Kruco** ». Skribu multnombre al Venkelstr. 15, Eindhoven (Nederland). Respondo garantiata!

ANGLAJ SAMIDEANOJ serĉas gekorespondantojn en Belgujo. Sendu detalojn pri aĝo, inklinoj, ktp. al J. R. Douglas, 40 Fern Avé, Whitburn Coll., Nr. Sunderland, Anglujo.

SE VI DEZIRAS korespondant(in)on en Francujo skribu detale al F-ino J. Dedicu, 23, rue V. Hugo, PRADES, Pyr. Or., Francujo, kiu helpos vin!

HOTEL MONDIAL

15 Graaf d'Ursellaan 15

HEIST-AAN-ZEE

Nette kamers — Verzorgde keuken
Fijne dranken

CAPITRO 11-a

La grandindustriisto tuj ekigis. Tio ŝajnis lia kutimo.

« Sinjoro Kant, ĉu vi certas ke estas murdo? »

Li metis la demandon sen enkonduko.

« Mi timas ke alia konkludo maleblas. »

« Nu! Kaj ĉu vi ankoraŭ ĉiam ne havas indikojn pri la murdanto? » La vorteto « ankoraŭ » estis forte akcentita.

« Bedaŭrinde, ne. Cetere estas multaj homoj surŝipe, sinjoro Steinmann! »

« Kaj kion vi nun intencas? »

« Mi ĝuste volis fari kelkajn demandojn al vi, sinjoro. »

« Kiel? Ĉu pridemando? »

« Nepe ne! Nepe ne! »

« Nenion mi scias pri la tuta historio. Mi timas ke ni ambaŭ perdas nian tempon, sinjoro Kant. »

Li levigis kaj etendis manon.

« Momenton, mi petas. »

« Vi eraras, sinjoro Kant, opinante ke vi ordonos al mi. Tie ĉi mi estis invitita kiel gasto kaj deziras esti tiel traktata. Diable... »

« Ĉu vi volas foje tralegi ĉi tiun dokumenton, sinjoro? » Kant transdonis al li la prokuren de la kapitano Joost. Sinjoro Steinmann cedis antaŭ la neeviteblo.

« Do, tamen pridemando. Nu, bone! Kion vi deziras scii? »

« Kial vi estis invitita de sinjoro Maxton „kiel gasto“? »

La viro ŝajnis ofendita.

« Kion vi scias pri tio? » li spitis.

« Mi demandas tion ja al vi, ĉu ne! » Kant rebatis.

Rimarkante ke li neniel venkos, sinjoro Steinmann decidis ne plu kontraŭdiri.

« Sinjoro Maxton invitis min kaj mian familion kiel intimajn amikojn. »

« Do, vi bone konis la mortinton? »

« Efektive, tre bone. »

« De kiam vi konis sinjoron Maxton? »

« H'm... paron da jaroj. » Li respondis la demandojn de Kant, ŝajnigante enuon. Tamen, li iom hezite diris la lastajn vortojn.

« Ne pli longe? »

« Ne. Ni estis aferamikoj. »

« Cu hieraŭvespere vi, ĝuste antaŭ noktomezo, aŭdis la pafon? »

« Ne. »

« Kie vi estis inter la dudektria kaj noktomezo, sinjoro Steinmann? »

« Jen insulto, sinjoro!.. Impertinento!.. »

Kant sentis malpaciencon, sed lia voĉo restis kvietita.

« Vi plene rajtas konsideri mian demandon kia vi preferas ĝin, sed mi rimarkigas ke vi ne jam respondis ĝin. »

« Se tio interesas vin, mi enligiĝis je la dudektria. »

« Poste vi ne plu eliris? »

« Mi ne estas somnambulo! » Steinmann fariĝis kruda. Liaj puĝaj vangoj purpurigis. « Poste mi respondigos vin pri ĉi tiuj fantoj, sinjoro!.. »

« Al via servo, sinjoro Steinmann. Ĉu vi ĉiam tiel tuj koleras... aŭ ĉu estas ĉar viaj aferoj ne estis finaranĝitaj? » kaj, aŭdeblante ridante, Kant levigis.

La pafotrafis celon, eĉ tiel ke momenton li timis ke la korpulenta viro ĵetos sin sur lin. Tamen, Steinmann estris sin, sed la pordo, kiun li klakfermis malantaŭ si, suferis lian venĝon.

Sammomente la lunĉonoro ilio tintis.

« Mi malsategas, Doktoro! Ĉu vi kuniras? »

JAĤTO VETURAS EL..

« KRIMINALA ROMANO »

La lunĉo tute fiaskis. Nur Kant senĝene regalas sin kaj ne atentis la aliajn.

La geografoj de la Fosse ne aperis. Dubois restis en la salono. La familianoj Steinmann sidis ĉe la ekstremo de la tablo kaj ŝajnis, tuj kiam Kant eniris, membroj de la gildo de la surdmutoj. La grandindustriisto mem sidis minace malsevena kaj enpensa. La sinjorino, solena, frosta, kun movoj kvazaŭ pesitaj. Neniu sur la jahto povis pretendi ke iam li vidis tiun ĉi slinkosmaskon ridetanta.

La filo Alex ade kunŝovis la brovojn, kvazaŭ defionta la tutan mondon pri duelo, sed li abunde trinkis vinon, ĝis la patrino signis ke sufiĉas.

Antaŭ li sidis la notario Van der Meersch. Ĉi tiu aspektis kompatinda. Lia kutima, mecerta, danda mieno tute forglitis. Li ŝajnis dek jarojn pli aĝa. Kant atentis la nervozan trajton ĉirkaŭ lia buŝo kaj la malbrilan rigardon de liaj okuloj.

Profesoro De Groot atentis nur sian edzinon. Yvonne Durllet kaj Stella Sterlen silente observadis kiel la du maljunuloj provis kuragiĝi unu la alian.

Kant sentis kiel oni evitas lin. Li iel kontentis pri tio, ĉar li povis sentigi al kelkaj personoj, kiuj ĝis tiam superule traktis lin, kiu nun tenas la bridojn.

Forlasante la manĝosalonon li petis Majstron Van der Meersch ĉe sin je la tria.

La notario volonte konsentis, ŝajnis atendinta ion tian, ĉar li respondis:

« En ordo, Inspektoro, en ordo; mi jam estus farinta tion sen invito... sed mi ne volis ĝeni vin. »

Tiumomente Kant rimarkis kiel Doktoro Gulopez provis ekbabili kun fraŭlino Durllet. Ĉu ĉar li bone manĝis, ĉu ĉar li esperis bonan rezultaton en la enketo, kio incitis lin al bona faro, ĉiukaze li turnis sin al sia juna kunlaboranto:

« Doktoro Gulopez, vi senĝene paŭzu duonhoron. Sekve renkontu min en la kajuto de Maxton, tie mi ankoraŭ havas laboron. »

« Mi ja helpu vin, sinjoro Kant? »

« Nu, estas tasketo kiun mi prefere faru sola. » Kant miregis pri sia propra grandanimeco.

Baldaŭ li sidigis ĉe la skribotablo de Maxton kaj rapide surpaperigis ekzaktan planon. La ĝusta loko de la mebloj, la situo de la kadavro; ĉio estis precize indikita.

Li ankoraŭ tute profundigis en ĝi kiam Doktoro Gulopez aliris lin.

« Trovis ion? » tiu ĉi vigle demandis.

« Ne, kreis artaĵon », grumblis la viro malantaŭ la pupitro. « Jen, mi havas la impreson de io ne kongruas, sed kio? »

« La kamenkadro tie ĉi... » hezite diris Doktoro Gulopez.

« Mi jam zorgo esploris; ĝi konvenas nur al tio por kio ĝi servas: ornamo por elektra fajrujo. La tuto estas solida. Eĉ ne unu truon en ĝi. »

« Sciu », la ŝakmajstro diris post ioma silento, « mi jam demandis al mi mem kiel neniu aŭdis la pafon escepte nin kaj Higgs. »

« Tre simple. La vandoj estis konstrui-

Verkis : Deck Dorval.

Tradukis : Dro T. Ken.

taj sonsorbaj. Kaj vi forgesas ke ankaŭ fraŭlino Durllet aŭdis la pafon. »

« Tio estas, ŝi deklaris ke, kiam fraŭlino Sterlen komunikis al ŝi la malfeliĉon, ŝi kredis memori ion tian. Sed ŝi ne pli atentis tion, ĉar estas aliaj eksterkutimaj bruoj surŝipe. »

« Vi havas mirindan memoron, Doktoro! »

« Kial? »

« Vi preskaŭ laŭvorte ripetas kion fraŭlino Durllet deklaris. »

« Nu, Inspektoro, se vi tiel precize scias tion, via memoro almenaŭ valoras la mian », Doktoro Gulopez rekompentis.

« Sed, revenante al la pafon, ĝin aŭdis ja ni. »

Kant montris la plafonon. Ĉirkaŭ la lustro estis granda ajura rozo.

« Ĉu vi vidas la aerumilon? Hieraŭvespere ni hazarde troviĝis apud la loko kie ĝi eliras. Aparato kun duobla metala krado, kiun eĉ kulo ne trapasus. Higgs povis aŭdi ion, ĉar lia kajuto flankas ĉi tiun, kaj certe ankaŭ en la koridoro la pafon estis aŭdebla, sed tie, kiam ni scias, estis neniu. »

Estis preskaŭ la tria.

« Nu », Kant diris, « ni iru al mia kajuto, ĉar homo kia la notario estas akurata. »

Li pravis. Apenaŭ li fermis la kajuton de Maxton, kiam Majstro Van der Meersch aperis en la koridoro.

« Jen, sinjoro Kant. »

« Ĉu vi volas iri en mian kajuton? »

Doktoro Gulopez rekomencis la notadon. La inspektoro plenstopis sian grandan kurban pipon kaj ekfumegis. Iel li similis saksofoniston. Ĉe ĉiu longa fumtiro, surda, tirata fajfeto estis aŭdebla. La notario atende pinĉis siajn etajn lipharojn.

« Vi bone konis sinjoron Maxton, Majstro? »

« Bonege, Inspektoro, bonege! La novajo pri lia morto estis bato por mi, tre forta bato. » La notario Van der Meersch kutimis senutile ripeti partojn de siaj frazoj.

« Vi estis lia notario, mi kredas? »

« Prave, tute prave! La lastajn jarojn ĉiuj aktoj de sinjoro Maxton estis redaktitaj en mia kabineto. Ĉiuj, sinjoro. »

« Vi de perdas gravan klienton? »

« Efektive, tre gravan, certe, kaj... precipe bonan amikon. Kiel mi diris, Inspektoro, estas forta bato por mi. »

La tinkturitaj lipharoj havis komikan aspekton en la konsternita vizaĝo, kiu volis esprimi malesperon.

« Kie vi estis, Notarie, kiam la murdo okazis? »

« Mi timas ke mia atesto ne tre riĉos. Mi estis en mia ĉambro. »

« Ĉu vi ne aŭdis la pafon? »

« Ne, tute ne. Kiel ĉakladanto mi sentis min iom humiligita pro la hieraŭ malvenko antaŭ nia amiko Gulopez. Mi rekonstruis la tutan ludon helpe de miaj notoj. Se en la 39-a puŝo mi estus oferinta mian ĉevalon, mi eble estus trudinta nulpartion! »

Kant pacience lasis pasi tiun devojiĝon

de la notario, dum Doktoro Gulopez diligente notis.

« Kiu heredas la posedojn de sinjoro Maxton? »

Momenton la vizaĝo de la notario malsereniĝis.

« Sinjoroj, mi petas la plej striktan sekretion, ĉar temas pri delikata afero! Profesia sekreto! Sed ĉar tio eble utilis al vi... Jes, versajne... » li tuj aldonis, kiam li rimarkis la konsentan kapoklinon de Kant. « Precipe heredas la grafino de la Fosse. Vi eble scias, sinjoro Maxton ne havis rektajn heredantojn. Eĉ ne en fora linio ĉi heredas de li, neniu estas konsiderenda. La edzino mortis, same la unika filino. »

« Sed tiu ĉi ja edziniĝis? »

« Neniel, sinjoro Kant, neniel. Pri tio vi craras. »

« Ĉu estas aliaj testamentaj donacoj? »

« Jes, jes, por kelkaj bonfaraj organizoj kiujn la mortinto prezidis, sufiĉe grava sumo por la ĉambriŝto Higgs, same por la sekretariino, fraŭlino Durllet, kaj krome por kelkaj amikoj. »

« Do, ankaŭ por vi? »

« Jes, Inspektoro, sinjoro Maxton nepre deziris ke mi akceptu tion de li, li nepre deziris tion. Mi ja rifuzis, sed kiel mi diris, li nepre volis. »

« Do, la rilatoj inter vi kaj la viktimo estis bonaj? »

« Bonaj, Inspektoro, eĉ tre bonaj; pro la morto de sinjoro Maxton, mi perdas unu el miaj plej bonaj amikoj. »

Kant duoble fumtis, ega fumonubo levigis.

« Majstro Van der Meersch, jam antaŭ iom da tempo sinjoro Maxton sendis al vi leteron en kiu li forte insistis ke vi senkompte akaparu je ĉia prezo iujn akciojn. Tiu skribo fakte estis admono. Vi certe memoros tion? »

« Nu, kompreneble, sinjoro Kant, ja tuj mi scias kion vi celis. Sinjoro Maxton poste komprenis ke li eraris, jes, li eraris kaj rekonis ke mi eminente administris liajn interesojn en tiu afero. »

« Kiuj akcioj estis? »

« Ĉu tio gravas? »

« Oni neniam scias. »

« Temis pri akcioj de la « Iron and Steel Corporation ». »

Nur la potence forblovata fumo perfidis la surprizon de Kant.

« Tiun ĉi truston estras ja sinjoro Steinmann! »

« Efektive, Inspektoro, efektive. Sinjoro Maxton komisiis min por aĉeti tiom da akcioj kiom eble. »

« Celante kion? »

« Tion mi ne scias, sinjoro Kant. En tiu afero mi estis kompetenta nur pri la aĉeto de la akcioj. Nepe ne pli, nepe ne! »

« Dankon, Majstro Van der Meersch. »

La notario grave etendis manon al ambaŭ viroj kaj feriris.

« Unue, Doktoro Gulopez, Dubois devas ekspliki ion. Li deklaris al ni ke li edziĝis kaj la notario kontraŭdiras tion. Tio ne ĝustas, kaj se oni akceptas ke Majstro Van der Meersch diris la veron, kial do Dubois mensogis? »

« Ĉu mi petos lin tien ĉi? »

« Volonte. »

Kant ree profundigis en la plano de la mortoĉambro, kiam Doktoro Gulopez enŝormis.

« Rapidu, rapidu, sinj